

Claude GACOND kaj Michel FRESARD:

Kurso pri la esperanto-fonetiko, 5a leciono

Radioprelego de Claude GACOND kaj Michel Frésard, SRI, 1986.02.15

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-163/Radiokasedo-163-4-86-B-1016-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-Kurso-pri-la-esperanto-fonetiko-5a-leciono.mp3>

M.- Parolas Michel Frésard kaj Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni havas nian kvinan kaj lastan lecionon pri fonetiko. Tiel ke, se vi bonvolas, ni daŭrigas per la dua parto de nia studo koncerne la konsonantajn sonojn. Sed ĵus antaŭe vi rememorigu la elparolajn specojn konsonantajn, kiujn oni havas en esperanto.

Cl.- Tre volonte. Mi bone memoras, ke oni havas ses elparolajn specojn konsonantajn en esperanto. Unue, la maldaŭran ...

M.- kiel ĉe la "p" kaj la "b", la "t" kaj la "d", la "k" kaj la "g".

Cl.- Due, la malsimplan ...

M.- ... kiel ĉe la "c", la "ĉ" kaj la "ĝ".

Cl.- Trie, la daŭran ...

M.- ... kiel ĉe la "f" kaj la "v", la "s" kaj la "z", la "ŝ" kaj la "ĵ", la "ĥ", la "h".

Cl.- Kvare, la nazan ...

M.- ... kiel ĉe la "m", la "n".

Cl.- Kvine, la ambaŭflankan, kiel ĉe la "l".

M.- Sese, la vibran, kiel ĉe la "r".

Bone. Nun ni studas tiujn konsonantajn sonojn alimaniere, t.e. laŭ iliaj ses esperante eblaj punktoj artikulaj en la buŝkanalo. Tiel ni havas unue la dulpajn, due la lipdantajn, trie la dantajn kvare la postalveolajn, kvine la velajn, sese la glotajn.

Cl.- Profesoro, ĉu vi povus klarigi al mi ĉiun el tiuj fakaj vortoj ?

M. - Plezure. La konsonanto dulpas estas parolsono, prononcata kun fermo aŭ malvastigo de la buŝkanalo per alproksimigo de la du lipoj, ekzemple la "p".

Cl.- "p" ... ĉu ankaŭ "b"?

M.- Tutcerte. La konsonanto lipdenta estas parolsono, prononcata per fermo aŭ malvastigo de la buŝkanalo dank' al alproksimigo de la malsupra lipo kaj de la supra dentaro, ekzemple la "f".

Cl.- "f" ... ĉu ankaŭ "v"?

M.- Jes. La konsonanto denta estas parolsono prononcata per fermo aŭ malvastigo de la buŝkanalo dank' al alproksimigo de la langopinto al la supraj dentoj aŭ al la supraj dentalveoloj, ekzemple la "t".

Cl.- "t" ... ĉu ankaŭ "d"?

M.- Jes, tiel via voĉa "d" kiel mia senvoĉa "t".

C1.- Kio signifas voĉa kaj senvoĉa?

M.- En fonetiko oni parolas pri voĉa konsonanto, kiam dum la elparolo de tiu sono la voĉkordoj vibras ...

Cl.- ... kaj oni parolas do pri senvoĉa konsonanto, kiam dum la elparolo de tiu sono la voĉkordoj ne vibras.

M.- Efektive. Poste ni havas la konsonanton postalveolan. Ĝi estas parolsono, prononcata per fermo aŭ malvastigo de la buŝkanalo, produktita de alproksimigo de la langopinto al la posta parto de la supraj gingivoj, ekzemple la "ĉ".

C1.- "ĉ" ... kaj ankaŭ "ĝ" ... ĉu ne?

M.- Jes. Nun ni havas la konsonanton velan. Ĝi estas parolsono, prononcata per fermo aŭ malvastigo de la buŝkanalo, kiun estigas alproksimigo de la langa dorso al la velo, ekzemple "k" ...

Cl.- ... "k" senvoĉa ... aŭ "g" voĉa ...

M.- Tre bone. Laste ni havas la konsonanton glotan, kiu estas parolsono dum kiu, aŭ dum parto de kiu, la gloto estas fermita, ekzemple "h".

Cl.- "h" ... kaj ankaŭ ...

M.- ... nenio, ĉar en esperanto ne ekzistas la kontraŭa konsonanto voĉa.

Cl.- Mi kontentas, ke vi klarigas al mi la fonetikan fakon per vortoj finfine kompreneblaj, dum PIV proponas francdevenajn neologismojn, kiujn mi neniam kapablis asimili.

M.- Do, komprenante jam sufiĉe bone tiun fonetikan fakon, vi certe kapablas lokigi ĉiun konsonantan sonon ĉe ties taŭgan situon. Kiel ni ĵus diris ... la du maldaŭraj konsonantoj dulipaj estas ...

Cl.- ... "p" kaj "b" ...

M.- ... la du dentaj ...

Cl.- ... "t" kaj "d" ...

M.- ... la du velaj ...

Cl.- ... "k" kaj "g".

M.- Ĉe la malsimplaj konsonantoj ni havas "c" ...

Cl.- ... kiu estas denta.

M.- Poste, ĉiam ĉe la malsimplaj konsonantoj, ni havas "ĉ" kaj "ĝ".

Cl.- Profesoro, ŝajnas al mi, ke vi forgesis la parolsonon voĉan, kiu kontraŭiĝas al la parolsono senvoĉa "c" pri kiu vi parolis ĵus antaŭe.

M.- Ne, mi ne forgesis ĝin. Fakte en esperanto oni realigas tiun formon pere de la konsonantoj "d" kaj "z", kiel ekzemple ĉe la vorto edzo. Nun ni revenu al "ĉ" kaj "ĝ" ...

Cl.- ... kiuj estas postalveolaj.

M.- Jes, vi tute pravas. Poste, ĉe la daŭraj konsonantoj, ni havas du lipdentajn, ĉu ne?

Cl.- Jes. Ili estas "f" kaj "v" ...

M. - ... du dentajn ...

Cl.- ... "s" kaj "z" ...

M. - ... du postalveolajn ...

Cl.- ... "ŝ" kaj "ĵ" . . .

M. - ... unu velan, kiu estas "ĥ" ...

Cl.- ... kaj unu glotan, kiu estas "h".

M.- Tre bone. Poste, ĉe la nazaj konsonantoj, estas "m" kaj "n" ...

Cl.- ... "m" dulipa ... kaj "n" denta.

M.- Jes. Antaŭlaste estas unu ambaŭflanka konsonanto ...

Cl.- ... t.e. "l"

M.- ... kaj laste unu vibra konsonanto ...

Cl.- ... t.e. "r".

M.- Bone. Nun por finigi nian kurseton pri fonetiko ni parolos iomete pri la vorto en esperanto. Ĝenerale oni distingas en la esperanta vorto:

- 1) la radikon, unuo signifa, kies tuto konstituas la leksikon;
- 2) la afikson (prefikson aŭ sufikson), unuo neleksika, kiu modifas la sencon de la radiko;
- 3) la finaĵon gramatikan.

Sed pli kaj pli ŝajnas al la esperantaj lingvistikoj, ke tiuj tri distingo ne sufiĉas, ĉar oni vere devus pli antaŭenigi la analizon reliefigante la specifan karakteron de esperanto, kiun Zamenhof priskribas tiel en sia Fundamenta Krestomatio (pp. 234-235). Bonvolu legi tiun belan kaj interesan tekston de Zamenhof!

Cl.- "Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn tiel, ke la tuta lingvo anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj konsistas sole nur en senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj, ktp., estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed, ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj. Tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon, kiu por la lernanto estas tute senbezona, li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.

M.- Tiam Zamenhof klarigas, ke la vorto ‚fratino‘ konsistas fakte el tri vortoj: ‚frat‘ + ‚in‘ + ‚o‘.

Cl.- En tia maniero la dismembrigo de la lingvo neniom embarasas la lernanton. Li eĉ ne suspektas, ke tio, kion ni nomas finiĝo, aŭ prefikso aŭ sufikso estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto, aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto.

M.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Michel Frésard kaj Claude Gacond diras al vi, ĝis la venonta sabato!